3-a Jaro. N-o 149 APERAS SEMAJNE 6. Aŭgusto 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

30-gr

NI MEMORU!

Jam forpasis dektri jaroj de kiam patriotisma febro ekkaptis Eŭropon. Tiu terura intelekta malsano kaŭzis la morton de pli ol dek milionoj da homoj kaj la kripligon de ne malpli multaj, kaŭzis nepriskribeblajn ruinojn kaj nekalkuleblajn detruadojn. Ĉe la komenco de la epidemio H. Barbusse estis ankaŭ atakata de la terura patriotisma febro; sed baldaŭ li kuraciĝis kaj verkis libron "Le Feu" (La Fajro), kiu faris lin mondfama.

Okaze de la dektria datreveno de tiu katastrofa epidemio, niaj legantoj certe bonakceptos la ĉi suban tradukon el la fama libro. Evidentas, ke nuntempe la cirkonstancoj estas tre favoraj por ke denove la sama febro ekkaptu la popolojn. Necesas sin gardi kaj se ne eblos savi sian korpon el la buĉado, almenaŭ la spirito restu sana kaj imuna kontraŭ la patriotisma malsano.

Red.

Ĉu vi forgesis tion?



Post "glora" batalo.

La atako

La taluso kovriĝis ĉiuflanke per viroj, kiuj, samtempe kiel ni, malsupren ekkuregas.

Kelkaj kugloj, tiam, alvenas inter nin. Bertrand krias al ni ŝpari niajn grenadojn, atendi ĝis la lasta momento.

Sed la sono de lia voĉo perdiĝas; subitege, kontraŭ ni, sur la tutan larĝecon de la deklivaĵo, malhelaj flamoj ekĵetiĝas, frapante la aeron per teruregaj eksplodbruoj. Surlinie, de maldekstre al dekstre, flagraĵoj eliĝas el la ĉielo, eksplodaĵoj eliĝas el la tero, estas timegiga kurteno, kiu disigas nin de la mondo, disigas nin de la estinto kaj de la estonto. Oni falŝanceliĝas, oni sin retenas unuj al la aliaj, en grandaj fumondaĵoj. Oni vidas kun siblegaj brukrakoj kaj ciklonoj da tero pulvorigita, al la fundo, kien ni intermiksite ekkuregas, kraterojn malfermiĝantajn, tien ĉi kaj tien, unuj apud la aliaj. Poste oni ne plu scias, kien falas la elpafoj. Oni vidas, oni sentas pasi apud sia kapo splitojn kun ilia bruo de varmeruĝa fero en akvo. Dum ekpafego mi ekmaltenas mian pafilon, tiom la blovo de eksplodo bruldoloris miajn manojn. Mi levas ĝin ŝanceliĝante kaj reforkuras kun la kapo al tero en la ŝtormon[1]) je vulpokoloraj eklumoj, en la premantan pluvon de la lafoj, vipegita per ekĵetoj da karbopolvo kaj fulgo. La siblegecoj de la pasantaj splitoj doloriĝas la orelojn, frapas la nukon, traboras la tempiojn, kaj oni ne povas reteni krion, kiam oni ilin suferas. La koro estas tordita, oni sentas naŭzon pro la sulfureca odoro. La blovoj de la morto nin puŝas, nin suprenlevas, nin balancas. Oni eksaltegas; oni ne scias, kie oni marŝas. La okuloj palpebrumas, blindiĝas kaj ekploras. Kontraŭ ni, la vidado estas obstrukcita per fulmobrila lavango, kiu okupas la tutan lokon.

Estas la baraĵo. Oni devas trapasi tian torenton de flamoj kaj tiajn teruregajn nubojn vertikalajn. Oni pasas. Oni estas pasinta blinde; mi vidis tien ĉi kaj tien

[1]) Ventegon.

homformojn turniĝantajn, supren leviĝantajn kaj kuŝiĝantajn, lumitaj pro subitega transmonda rebrilo. Mi videtis strangajn vizaĝojn, kiuj eklaŭtigis iajn kriojn, kiujn oni ekvidis ne aŭdante ilin en la bruega neniigo. Ardaĵo kun grandegaj kaj furiozaj amasoj ruĝaj kaj nigraj falis ĉirkaŭ min, kavigante la teron, ĝin forigante el sub miaj piedoj kaj flanken ĵetante min, kvazaŭ resaltantan ludilon. Mi memoras esti transpaŝeginta kadavron, kiu brulis, tute nigra, kun sternaĵo da ruĝega sango, kiu rostekraketis sur ĝi, kaj mi memoras ankaŭ, ke la baskoj de la kapoto, kiu moviĝis apud mi estis ekflamiĝintaj kaj postlasis fuman sulkon. Ĉe nia dekstro, laŭlonge de la traireja tranĉeo 97-a, oni havis la rigardon allogitan kaj duonblindigitan per vico da teruregaj iluminacioj, premantaj unu ĉe alia, kvazaŭ homoj.

El "La Fajro", de *H. Barbusse,* esperantigis *1784.*



VIENA REVOLUCIO

La Versailles'a "pactraktato", kiu estas nenio alia ol sensencaĵo, faris al la multsuferinta homaro malbonaĵojn, kies sekvoj estas ankoraŭ dolore sentataj. La kapitalista politiko de disigo kreis malgrandajn ŝtatojn, kiuj apenaŭ povas ekonomie ekzisti. Sufiĉas malgranda fajrero tie por okazigi brulegon, buĉadon. Ke la stato en tiaj ŝtatetoj estas nefirma, ĝis ili ne aliĝas al iu pli granda aŭ ne formas konfederacion, tre klare montras la lastaj okazintaĵoj en Aŭstrio.

Tri faŝistoj estis akuzitaj, ke dum la landaj elektadoj en januaro n. j. en la vilaĝo Schattendorf ili mortpafis du laboristojn. Ilia proceso okazis dum ok tagoj en Wien kaj fine, la 14-an de julio, la t. n. "demokrata" kaj "sendependa" juĝistaro nenian kulpecon vidis en la mortigo kaj liberigis la tri faŝistojn. Ĝia faro tre incitis la Laboristaron, ĉar ne por unua fojo estis, ke la mortigistojn nur proforme juĝis aŭ liberigis la samklasa juĝistaro: ja, korvo al korvo ne pikas la okulojn. Nature, tio kondukis al ribelo, al revolucio.

Vendrede, la 15-an, la ekscitita Laboristaro organizis grandan manifestacion kontraŭ la liberigo de la faŝistoj. Kiam la amaso alvenis al la universitato, kie multaj faŝistaj studentoj lernas, tiuj ĉi komencis inciti ĝin, la ĉeestantaj policistoj defendis ilin kaj tiel ekiĝis la batalo. La policistoj ekuzis revolverojn kaj glavojn. Viktimoj — mortintoj kaj vunditoj — restis sur la batalejo. Post tiu ĉi okazintaĵo la amaso jam estis por la batalo. La manifestacion oni daŭrigis kaj dume alvenis pli kaj pli da proletaj amasoj el la laboristaj urbopartoj. Ne malproksime de la universitato estas la palaco de la ĉefjuĝejo, la celo de la amaso, kiu survoje bruligis policgardejon. Kaj antaŭ la ĉefjuĝejo ekstaris la amaso, ĉirkaŭis ĝin kaj komenciĝis denove la batalado. Interne ankoraŭ estis policistoj, kiuj sin defendis per pafado, tamen fin-fine la amaso ekregis la tutan ĉirkaŭaĵon. La Laboristaro atakis la juĝejon, elĵetis surstraten la dokumentojn kaj ekbruligis ilin. Brulis ankaŭ la kvar-etaĝa grandega palaco de ĉiu flanko, kaj la alvenintaj fajrobrigadistoj pro la malhelpo de la amaso nenion povis fari.

Sed la vera sangobano komenciĝis nur posttagmeze je la 2.30 h. El kvar diversaj flankoj per soldataj pafiloj armitaj policistoj alvenis kaj senkompate ekpafis la nearmitan amason. Dekoj da K-doj restis sur la placoj kaj stratoj senvivaj aŭ grave vunditaj. Senĉese kuradis la aŭtomobiloj de la savunuiĝo. La amaso kurante savis sian vivon de la policistaj kugloj. Sed la faŝistaj elementoj ankaŭ ne dormis, multajn K-dojn ili vundis el la domaj fenestroj. Tiu ĉi batalado daŭris dum la tuta posttagmezo. Je la 6-a h. alvenis ankaŭ soldatoj kaj restarigis la kapitalistan "ordon" en la interna urbo.

La bataloj en la eksteraj kvartaloj estis daŭrigitaj dum la sekvanta tago precipe en la X-a kaj XVII-a distriktoj. Ĉio malsukcesis, ĉar la Proletaro nenie povis akiri armilojn. Kun bedaŭro estas konstateble, ke preskaŭ dum tutaj tagoj la partigvidantoj ne povis konduki la amasojn, preskaŭ sen gvidado estis ĉio, nur la faŝista registaro estis sur sia loko.

Senkompara estas tiu ĉi sangobano en tuta Eŭropo, kaj la buĉistoj estis tiuj policistoj pri kiuj ofte estis konstatite en laboristaj rondoj, ke ili estas kun ni. Kaj ni povas rememori, ke antaŭ jaroj vienaj SAT-anoj perforte volis aligi al SAT kelkajn policistojn. El la bedaŭrindaj okazintaĵoj ni povas konstati tion, ke la kapitalismo ĉie estas la sama, se ĝia intereso tion postulas, ke centoj da laboristoj mortu, la kapitalistoj ĉiumaniere atingas tion. La malsatanta Proletaro estas nur ĉasbestoj por ili, kaj iliaj servistoj la policistoj, ĝendarmoj, soldatoj kaj juĝistoj nur nin mortigas. Nature la kristana registaro kaj ĝiaj faŝistaj organizoj, kiel ĉie kaj ĉiam, denove Moskvon kulpigas pro la okazintaĵoj.

Ducent kvindek du K-doj estas kaptitaj de la polico. La enterigo de la viktimoj okazis la 20-an posttagmeze, sed krom la parencaro, Soc. Dem. Partigvidantoj, neniu povis ĝin partopreni.

Dum tri tagoj okazis ĝenerala striko, sed la 18-an jam ĉie oni rekomencis la laboron. La policestro restis, same la faŝista registaro. Verŝajne pli malfacilaj tagoj sekvas por la aŭstria Proletaro, ĉar la faŝistaj bandoj en la lando ĉiam pli kaj pli kuraĝiĝas...

Viena Ruĝulo.

Ni laboru por lerni; ni lernu por koni; ni konu por juĝi; ni juĝu por agi.

El la sendependa Polio

Oni persekutas SAT-anojn!

En la judlingva "Naje Folkscajtung" (Varsovio) de la 19. 6. 1927 mi trovas jenon:

"Tarnov. Antaŭ kelkaj tagoj en la ĉi tiea distriktjuĝejo antaŭ ĵurintaj juĝistoj okazis proceso kontraŭ tri polaj laboristoj: Vojnarski, Smaga kaj Vieĉorek pro aparteno al la komunista partio, disvastigo de literaturo ktp. La akuzitoj ne konfesis, sed deklaris, ke ili estas membroj de la esperantista laborista tutmonda asocio (SAT — *Iuelm.).* Kiel atestantoj aperis plejparte defendantoj kaj kiel eksperto superkomisaro Vronski el Krakovo, kiu sciis rakonti, ke la esperanto-asocio estas komunista (! — *Iuelm.)* kaj por poliaj ŝtatanoj la aparteno al ĝi estas malpermesata. Neniaj pruvoj estis. La akuzo apogis sin sole sur supozoj. Post la parolado de la prokuro, kiu "lekciis" pri "juda bolŝevismo" kaj post la bonegaj paroladoj de la advokatoj D-ro Aleksandroviĉ el Krakovo kaj D-ro Merc el Tarnov, la ĵurintoj per 8 voĉoj kontraŭ 4 kulprekonis la akuzitojn. Vojnarski kaj Smaga ricevis po 4 kaj Vieĉorek 1½ jarojn da peniga malliberiĝo. La verdikto faris premegan impreson." *Iuelmultiuj.*



Vivo kaj Profito

Permesu postskribon al la artikolo *Morto, Heroismo, Ploroj* (n-o 131/132) pri la karbmineja katastrofo ĉe Kum en Suda Kimrolando. Nun funkcias la oficiala enketo. La karbministoj atestas, ke ili ne rifuzis labori en veneniga gaso ĉar ili timas perdi sian okupon. Nur gravis la pligrandigo de la karbproduktado al la oficialaj respondecaj ekzamenistoj. En grandaj truoj en la plafonoj de la subteraj tuneloj amasiĝas la gaso. Fajretoj daŭre devenis de la malbonaj rululoj de la transportadaparato. Kelkfoje la karbministoj protestis kaj unu eĉ disputis kun ekzamenisto ĝis ili interpugnobatis. Kompreneble la oficistoj neas la asertojn de la laboristoj pri la kaŭzo de la terura afero kaj penas pruvi, ke unu laboristo kontraŭ reguloj portis alumeton en la venontan mortejon de la 52 viktimoj. La advokato de la kompanio riproĉis la atestantojn, ke ili restis en la laborejo, kiam ili ne povis labori pro la granda kvanto de la gaso. Laŭ li, kvankam la laboristo estis sen salajroj antaŭe dum sep monatoj, li devas esti "honesta" al la mastro kaj ne timi perdi pagon por iu labortago. Denove evidentiĝas, ke la ekzamenisto, la laŭleĝa respondeculo je apliko de la vivprotektantaj reguloj, ne povas servi kapitalistajn mastrojn, kiuj nur prizorgas pli grandajn profitojn. La karbminista sindikato ĉiam petas, ke la Ŝtato sendepende kaj senpere dungu kaj direktu la ekzamenistojn.

Signifplene nur la "Daily Herald" raportas pri la enketo. La kapitalistaj ĵurnaloj tute silentis. Iliaj falsaj krokodilaj larmoj de majo sekiĝis kaj ili ignoras la kaŭzojn de la ofero de la 52 mortintaj karbministoj same kiel la kreskantan senlaborecon de la vivantaj.

(488.)



MIA BELA TAGO

Kiam la suno levas sian oran manon por frapi ĉielan bluan kordaron, tiam mi leviĝas. Oraj sonoj de radioj penetras min dum lavado kaj matenmanĝo. Mi rapidas al la Instituto de Popola Mastrumado je la 9-a h. matene kaj suneto, mia frato, mia brava muzikanto longe, longe, sonas per oraj par-tamburoj.

Kaj mi, estinta helptornisto de ĉefa Krjukova Vagonara Metiejo, dum rava simfonio de la tago, preparis min por estonta ruĝa diplomato. Mi estas 23-jara kaj amas sunon, ŝatas ĝian sonorilon fajroĵetantan, ĉar la suneto somera ellasas ĉielajn sonetojn!



Antaŭ la prolet-revolucio mi loĝis dum 7½ jaroj en caraj, denikinaj kaj aliaj internulejoj porinfanaj. Nun, laŭ la volo de venkinta Proletaro, mi povas efektivigi miajn revojn, utiligi miajn talentojn. Mi studas senpage en Supera Lernejo ĉiutage de la 9-a ĝis la 15-a h. Ni, proletaj studentoj de la jurista fakultato, studas jenajn disciplinojn: marksismonleninismon — tiun filozofion de proleta batalo, tutan "Kapitalon" de Marks, teorion de leĝoscienco kaj de ŝtato, teorion de Sovetia jurscienco, samkiel alilandan, internacian, administracian leĝosciencon, historion de sociaj institutoj, statistikon, diversajn kodojn kaj lingvojn — anglan, francan, germanan. Nia metodo estas plena Dalton-plano (laboratorioj, bibliotekoj ktp.). La studado tre kontentigas min. Ĝis la 4-a h. posttagmeze, post la tagmanĝo, mi ripozas. Iafoje Centra Komitato de Kompartio de Ukraînio alvokas min kiel propagandiston por plenumi ian taskon (ĉar mi estas en tia grupo). Marde kaj ĵaŭde de la 5-a ĝis la 7-a h. mi gvidas la leninan rondon de niaj studantoj-komsomolanoj. Dum aliaj tagoj mi kuras al Ŝtata Eldona Oficejo por akceli la eldonon de miaj tri libroj (rakontoj kaj noveloj).

Kiam la suno tuŝas la horizonton per sia ora arĉo, kiam violonaj sonoj de l' vespero trairas la aeron, mi sentas la sopiron al eksterlandaj SAT-fratoj kaj mi skribas esperantajn leterojn al K-doj en 9 landoj. Mi utiligas esperanton tre larĝe. Kelkaj K-doj sendadis al mi artikolojn pri la beletristiko de sia lando kaj mi helpas por presigi ilin en niajn ukrainiajn ĵurnalojn. Mi sendas ofte al K-doj niajn gazetojn kaj librojn. Mi korespondadis kun Henri Barbusse, Jakub Kolas (el Blankrusio), Izgur kaj aliaj verkistoj.

Kaj rapide la blua tornisto — bela nokto alvenas kaj mallarĝa luneto — tiu flava tranĉilo el viola metalo kondukas sian signon tra fera enkirasa ĉielo. Tiam maldikaj rabotaĵoj kiel multaj steloj estas disŝutitaj en profundan vaston de noktejo. De la 7-a ĝis la 9-a h. mi vizitas miajn kunfratojn laŭ skribilo — verkistojn en Literatura Klubo je la nomo de V. Blakitny (mi estas membro de Tutukrainia Unuiĝo de Proletaj Verkistoj). Je la 9-a h. mi vespermanĝas kaj, se la Muzo ekflugas en mian koron, mi verkas ĝis la 12-a aŭ ĝis la 1-a h. nokte.

Mia Ino (ŝia nomo estas Ino) jam promesis lerni esperanton, kaj mi helpas en tiu afero — lerni la lingvon de la Mondo. Ŝi estas studentino sed senpartia revolucianino. Ofte ni havas diversajn kunvenojn: partian, profunuiĝan, studentan kaj aliajn kunsidojn.

Tuta tago estas pasanta tiel, minuto post minuto, horo post horo. Ĉiu tempero estas plena je pensoj, aferoj, studado, laboro ktp.

Jen tre laca, elkurinta dum bel-tago kaj feliĉa, ke mi portas malgrandan eron de kolektiva laboro, de prolet-taskoj, mi dormetas kaj poste dormegas kiel mortinto. Kaj tiam super mi la nokto ludas sian lastan melodion de songoj.

Rulu la kapo, batu la koro pli rapide, ni iras feste al Estonto kaj poste ĉiu nia paŝo, ĉiu spiro, ĉiu movo rebrilos grandioze sur ekrano de l' Venonto!

Vl. Kuzmiĉ (3975).

☆ DISKUTEJO ☆

Letero en la Redakcion

Estimata K-do Redaktoro!

Mi tre petas vin enpresi en "Sennaciulo" la ĉi suban artikolon, respondantan al la tute maljusta kritiko pri via artikolo "Kuraĝega Sennaciigulo". Mi timetas, ke pro troa kaj malĝuste komprenita senpartiemo kaj modesteco vi ĵetos mian artikolon en vian faman paperkorbon... ĉar ĝi (la artikolo, ne la paperkorbo) kvazaŭ defendas vin...

Ne faru tion! Ne vin mi certe volas defendi, nur viajn ideojn. Kaj, se vi enpresis artikolon de K-do diranta "ne!" enpresu ankaŭ tiun ĉi, kiu diras "jes!"

Bonvolu akcepti ktp. *2043.*

Ĉu burĝa ideologio kaj kies?

En la n-ro 145 de "*S-ulo*" mi legis kun grandega plezuro la artikolon "For la burĝan ideologion!" Mi tutege konsentas kun ĝia aŭtoro. Vere indigninda estis ja la artikolo de K-do Lanty entuziasme salutinta la heroon de l' aviado, Lindbergh. Tiu ĉi artikolo estis skribita en tute nekutima maniero. Pli bonaj tradicioj de proleta literaturo estis en ĝi fuŝitaj.

Ĉu K-do Lanty forgesis, ke en la fino de ĉiu artikolo oni nepre devas historie kaj kursive elkrii: "Vivu la tutmonda Proletaro (...aŭ revolucio, laŭdezire)!", "Morton al la tutmonda kapitalistaro (...aŭ burĝaro, laŭguste)!" Tio estas sankta tradicio! Kial do K-do Lanty kuraĝis malsekvi ĝin?! Anstataŭe, li finis per vortoj: "Vivu Lindbergh, la kuraĝega sennaciigulo". Hontu, K-do Lanty! Vi arogas ne obei kutimon!

Sed tio ne estas ankoraŭ la ĉefa peko de nia gvidanto. Li agis ankoraŭ pli mallaŭdinde. Li (ne svenu!) ĝoje konstatis en sia artikolo la momente sennaciecan spiritostaton de la franca homamaso ĝenerale tre patrioteca, sed dum kelkaj horoj de entuziasma deliro aklaminta alilandulon. Sed kial do vi forgesis, ke en tiu homamaso troviĝis burĝoj?!

Fine vi ĝojas ĉefe pri tio, ke la nova venko kontraŭ la distanco proksimigis la du kontinentojn. Sed kiu tion profitos unue? Certe la kapitalistaro! Ekiĝos pli intensaj ekonomiaj rilatoj inter Eŭropo kaj Ameriko, la burĝoj pli bone gajnos. Vi vidas nun klare vian ter-r-ruran krimon!

Certe vi kiel marksano povus vin defendi, dirante, ke ju pli sennaciiĝas la ekonomia bazo, des pli sennaciiĝas ankaŭ la ideologio. Vi povus diri, ke laŭ Marks pli rapida disvolvo de kapitalismo pli rapide kondukos al socialisma soci-ordo. Vi povus diri, ke la Proletaro devas saluti ĉiun novan venkon de tekniko liberigantan nin el la ĉenoj de tempo kaj spaco. Vi povus eĉ diri, ke sennaciulo devas esti homo libere pensanta kaj ne ĉiam sekvanta la "sanktan tradicion" de senfinaj "vivu!.." kaj "morton al!..". Eĉ vi povus diri, ke burĝa estas ĝuste la ideologio de tiuj, kiuj la "sanktan tradicion" sekvas, kiuj ne volas kompreni kaj akceli la rapidan disvolviĝon de kapitalismo, kiuj en sia mallarĝa partia netoleremo ne povas kompreni, ke nur la sennacieca ekonomia bazo taŭgas kiel bona grundo por disfloro de sennacieca ideologio.

K-do Lanty! Mi vin pardonas. Mi volas kredi, ke vi estis tre laca, skribante vian artikolon kaj ke vi simple forgesis skribi la neprajn sakramentajn elkriojn.

Do... *vivu la tutmonda revolucio!*

Morton al..!

Vivu la tutm..!

Mor..! *2043.*

TRA ESPERANTIO

VII-a Kongreso de SAT

Lyon (Francio)

12.—16. aŭgusto 1927

7-a Komuniko

Kongresejo. — La kongreso okazos en la salonego "Emile Zola" de kooperativo "*L' Unitaire*", 127, rue Boileau, Lyon VI.

Por trafi la kongresejon, alvenante de la stacidomo Brotteaux, paŝu sur avenue Jules-Ferry kaj rue Bugeaud ĝis rue Boileau, turnu maldekstren kaj marŝu ĝis "l' Unitaire". Alvenante de ĉefstacidomo Perrache, supreniru tramon de linio n-o 7 ĝis strato Boileau. Tiam piede iru dekstren ĝis la kongresejo. Kosto de tramveturo: 50 centimojn (dimanĉe: 60 centimojn).

K-doj venantaj dum tago tre atentu en stacidomoj la kongreskomisarojn, kiuj portos sur la brako specialan rubandon verdruĝan.

Kongreskomitato. — Prezidanto: K-do Marcel Roux, 90, rue Boileau, Lyon VI (Francio) al kiu oni sendu aliĝilojn, leterojn, monon, ktp. Tiu adreso ne estas loĝeja, sed nur poŝta.

La 10-an, 11-an kaj 12-an de aŭg. la komitato deĵoros en la kongresejo kaj en la sidejo de Esp. Lab.-Grupo, 39, cours Morand, de la 9-a ĝis la 11-a kaj de la 14-a ĝis la 17-a, krom ĉe stacidomo la 12-an de aŭg. dum la tuta tago.

Kotizo. — Egala je SAT-kotizo. Ĝi estas pagota per naciaj bankbiletoj aŭ ĉeko en registrita letero al la Prezidanto.

Perantoj kaj agentoj[1]), kiuj enkasis kotizojn, bonvolu tuj pagi al la komitato; valoras nur la aliĝiloj akompanataj de mono.

6-a listo de aliĝintoj

204.	K-do	O. Brebant, Lyon	4719
205.	„	X., X.	4100
206.	„	G. Bosma, Amsterdam	5941
207.	K-dino	G. Wijnands, Amsterdam	8823
208.	K-do	J. D. Eynde, Sandpoort	8814
209.	„	J. Burov, Astraĥan	7069
210.	„	R. Nikolskij, Smolensk	5241
211.	K-dino	A. Nikolskaja, Smolensk	6798
212.	K-do	B. Borjan, Split	1786
213.	„	E. Liebetrau, Frankfurt	—
214.	„	J. Sonnery, Lyon	4720
215.	„	J. Allégret, Lyon	9514
216.	„	L. Péraire, Lyon	9344
217.	„	P. Druel, Lyon	8554
218.	„	J. Brenier, Lyon	9186
219.	„	J. Fourreau, Lyon	9184
220.	„	Cloupet, Lyon	10222
221.	„	A. Soarès, Lyon	6727
222.	„	A. Maslenko, Brjansk	4017
223.	„	J. Leichtfried, Linz	6077
224.	„	J. Zilberfarb, Ĥarkov	1334
225.	K-dino	H. Danneil, Genève	7528
226.	K-do	C. Bouvelle, Paris	1381
227.	„	Hasegaua, Tokio	—
228.	„	H. Wirz, Zürich	1446
229.	„	A. Herweg, Elberfeld	8011
230.	„	S. Eck, Elberfeld	10191
231.	„	E. Kissler, Griesheim a. M.	3317
232.	K-dino	R. Kissler, Griesheim a. M.	6192
233.	K-do	L. Puff, Frankfurt	320
234.	K-dino	P. Olesjeviĉ, Kamenskoje	8572
235.	„	P. Slivinskaja, Kamenskoje	8577
236.	K-do	Z. Polevik, Kamenskoje	8573
237	„	P. Ŝĉepakin, Kamenskoje	8578
238.	„	G. Bentkovski, Kamenskoje	8579
239.	„	M. Starr, London	488
240.	K-dino	B. France, Manchester	508
241.	K-dino	A. Pipkina, Moskvo	—
242.	K-do	Krjukov, Irkutsk	1897
243.	K-do	F. Bauer, Gablonz a. N.	139
244.	„	Schinkel, Leipzig	135
245.	„	Kraft, Halle	6151
246.	„	Fantasny, Halle	7862
247.	„	Wege, Halle	6148
248.	K-dino	Michaliĉka, Elektroperedaĉa	1311
249.	K-do	Michaliĉka, Elektroperedaĉa	1187
250.	„	Znamenskij, Ĉita	7855
251.	„	Liebig, Bielefeld	5838
252.	„	X., X.	553
253.	„	Schlittmann, Dachau	4159
254.	„	Iljin, Kuvŝinovo	9948
255.	„	Boev, Poltorack	4358
256.	„	Drezen, Moskvo	1518
257.	„	Urban, Leningrad	5089
258.	„	Demidjuk, Moskvo	1516

[1]) Ni sciis, ke Centra Komitato de SEU (Moskvo) kolektis aliĝojn. Sed kial la mono ne trafis nin, nek respondo sekve de niaj alvokoj?

Lasthora atentigo. — Por ebligi al la komitato bonan plenumon de ĝia tasko, la alvenontoj bonvolu informi K-don L. Gros, 22, rue Creuzot, Lyon VII (Francio) pri la tago kaj ĝusta horo de elvagoniĝo en Lyon.

Ilustritaj poŝtkartoj

kun la bildo de la marko kaj afrankita per la ĵus eldonita poŝtmarko mem estas rekte sendata el Moskvo kontraŭ 0,50 mk. germ. aŭ kontraŭ valoro de 2 resp. kuponoj.

La Adm. de SAT.

Al li ankaŭ oni sendu ĉion koncernantan restadon en la urbo kaj monon, kiel klarigite en la 6-a Informilo, por antaŭpago de manĝo- kaj dormokostoj.

Kiam tiu lasta komuniko estos presita en "S-ulo", la ge-SAT-anoj jam preparos siajn pakaĵojn por veturi al la urbo de la VII-a Kongreso. La granda deziro de la organizantoj estas, ke multaj samcelanoj respondu ilian koran kaj fratan inviton.

Vivu la VII-a Kongreso de SAT!

Vivu interfratiĝo de ĉiulandaj laboristoj trans limoj per esperanto, per SAT!

Komisiite de l' Kongreskomitato:
La prezidanto: *M. Roux.*

*

Grava Sciigo

POSTKONGRESA EKSKURSO PARIZON

Multaj kongresanoj emus, sendube viziti la belan ĉefurbon de Francio, Parizon. Tial la pariza grupo de la Laborista Esperantista Federacio organizas postkongresan ekskurson al Parizo. Loĝado, nutrado kaj promenoj de ĝiaj partoprenantoj estos plej bone prizorgitaj.

Dum la kongreso ĉiujn necesajn informojn pri tiu aranĝo donos K-do Marceau. Antaŭa sinanoncado ne necesas. Antaŭinformoj estas riceveblaj el SAT-sidejo (23, rue Boyer, Paris XX).

Vendrede, la 20. 8. 27 ĉiuj alilandaj K-doj venintaj Parizon parolos pri la laborista vivo kaj movado en grandega kunveno organizota en Laborborso. La pariza Proletaro aŭdu voĉon de alilandaj fratoj.

Por nia presejo

Ivanovo-Voznesensk (Sovetio), 14. 7. 27 j.

Por, ke ni pli rapide havu propran presejon; jenaj SAT-anoj laŭ propono de SAT-ano n-o 5959, memvole pagas po 50 kopekoj por Jarlibro de 1927:

1. Mizerovskij (n-o 5959), 2. Stefan (n-o 3409), 3. Lebedev (n-o 4696), 4. Budanov (n-o 9055), 5. Graĉev (n-o 6319), 6. Ŝibaev (n-o 7007),7. Lugovskaja (n-o 7682), 8. Govorov (n-o 7644), 9. Kiselev (n-o 7646), 10. Ĵuravleva (n-o 7645), 11. Kozlov (n-o 7677), 12. Kuznecov (n-o 7680), 13. Gornastalev (n-o 9056), 14. Studickij (n-o 7685), 15. Frolova (n-o 7643), 16. Komova (n-o 7676), 17. Samojlova (n-o 7684), 18. Kudrina (n-o 7678), 19. Voronov (n-o 7686), entute 9 rub. 50 kop.

Adreso: Ivanovo-Voznesensk, Sovetio, Ĉasovennaja str., Nikolao Mizerovskij, domo 46/2.

*

Maltrafa kritiko

Ni ricevis jenan leteron:

4-an de julio 1927.

Post vojaĝo mi hodiaŭ legis kion K-do *Ereto* skribis en "S-ulo" n-ro 143 pri la ITF-raporto koncerne la sindikatan rajton i. a.: "kia misuzo de tempo, papero kaj energio! ... K-do *Nathans*, vi estas ja esperantisto, do ..."[1]).

Efektive, mi opinias, ke la helplingvo povos plenumi gravajn servojn al nia movado kaj fine eble estos nemankebla. Sed estu praktika, K-do *Ereto*, nia raporto (demandu spertulon ĉu papero kaj presaĵo estas luksaj!) estis prezentita al la delegitoj de la X-a Ĝeneva kongreso: kiom da ili komprenus la esp-an tekston? En la nuntempaj cirkonstancoj la enkonduko de esp-o en niajn publikigojn signifus nur plimultigon de laboro, de elspezoj, misuzon de energio, dum ni jam nun ne havas tempon por fari la tutan laboron, kiun ni volonte volus fari. Plue, klopodo niaflanke ebligi eldonon de esp-lingva ITF-Bulteno, kondiĉe ke sufiĉaj anoj prenus abonon, malsukcesis: la nombro de la esp-istoj estis ankoraŭ tro malgranda, ne estis sufiĉa intereso.

Do, ni ne povas plimultigi nian multlingvan laboron per la enkonduko de esp-o sen praktika utileco, kaj devas provizore daŭrigi niajn penadojn *veki* intereson al la helplingvo en niaj rondoj (kio iom post iom sukcesas: en la daŭro de la lastaj jaroj jam deko de fervojistaj, maristaj kaj aliaj transportistaj unuiĝoj malfermis kurson kaj regule informas en la gazetoj pri la utileco de esp-o.

Kun kamaradaj salutoj! *Nathans.*

PS. **Mi aldonas 2.50 florenojn por Jubileo-Ĉeno de SAT kiel esprimon de mia persona ŝato por la SAT-laboro.**

[1]) **Rimarko redakcia.** — *Ereto* devus aldoni: ... *bone komprenas* kiom granda estos la ŝparo, kiam la laboristoj estos lernintaj esp-on.

Prikongresaj proponoj kaj diskutoj

Kelkaj rimarkoj pri nia "Programo"

Unue, ni rimarku, ke ne ĉiuj SAT-anoj abonas "S-ulo"-n, kaj sekve ne ĉiuj legis la jam publikigitan projekton.

Due, necesas ne forgesi, ke niaj kongresoj ne estas decid- sed nur propon-rajtaj. Se la kongreso aprobos iun tekston, do, necesos, ke ĝi estu submetata al definitiva akcepto aŭ malakcepto de ĝenerala voĉdonado. Ĉu niaj nunaj financ-rimedoj tion permesos?...

Ni supozu, ke nia "financministro" donos jesan respondon al tiu lasta demando. Tiaokaze necesos tre atente kritiki ĉiun frazon de la projekto, pririgardante la demandon je ĉia vidpunkto. Tiun kritikan laboron povos fari nur speciala komisiono, elektota de la kongreso kaj laboronta dum la kongresaj tagoj.

Sed jam nun eble ne malutilos kelkaj rimarketoj.

Mi opinias, ke kelkaj partoj de la projekto iel tro similas la programon de politikaj partioj. Ekzemple, ĉu vere SAT devas havi kiel taskon "batali kontraŭ la imperialistaj militoj?" Tio certe estas politika tasko. Tamen en alia parto estas dirite, ke SAT estas neniel politika organizo. Kuŝas do tie ia kontraŭdiro. Se SAT, difinus kiel unu el siaj taskoj la batalon kontraŭ imperialistaj militoj, ĝi tiel perdus sian karakteron de informa, kleriga, kultura, eduka organizo.

Sed eble iu diros, ke SAT devas akorde kun laboristaj partioj aŭ sindikatoj helpi en la batalo kontraŭ la imperialistaj militoj. Tiaokaze mi demandu, ĉu oni povas havi la certecon, ke ĉiuj laboristaj organizoj havos saman sintenadon rilate al estontaj militoj? Kaj kiu difinos, ĉu tiu aŭ alia milito estas imperialisma aŭ ne. Ĉu ni jam forgesis, ke en 1914 laboristaj partioj kaj sindikatoj asertis, ke Francio devas sin defendi kontraŭ la "germana imperialismo" — kaj Germanio kontraŭ la "cara imperialismo" ktp. Ĉu do nuntempe ne troviĝas laboristaj gvidantoj, kiuj kulpigas Sovetion je imperialismo kontraŭ Georgio?

Kompreneble ne temas ĉi tie diskuti pri la praveco aŭ malpraveco de tia kulpigo. Mi nur celas per tiuj ekzemploj montri, ke la enmeto en nia programo de tia frazo pri imperialismo povus estonte kaŭzi disputojn kaj miskomprenojn en niaj vicoj...

Pri la termino *imperialismo* mi faru ankoraŭ unu rimarkon, eble la plej gravan kaj diskutindan. Tuj ĉe la komenco de la projekto estas tute prave dirite, ke: "La evoluo de l' kapitalismo pli kaj pli detruas la barojn inter la popoloj. La kapitalista mondekonomio per fervojoj, vapor-ŝipoj, aeroplanoj, senfadena telegrafo kaj telefono najbarigas kaj intermiksas la plej malproksime loĝantajn naciojn kaj portas la konkeraĵojn de burĝa civilizacio en la plej kaŝitajn angulojn, al la malplej progresintaj gentoj de la mondo. *La imperialista epoko akcelas tiun disvolviĝon...*"

Mi substrekis ĉi tiun lastan frazon, tial ke ĝi montras alian kontraŭdiron en la projekto. Se la imperialismo akcelas la starigon de mondekonomio, — mondekonomio, kiu kreas la objektivajn kondiĉojn por la ekzisto de mondlingvo, ŝajnas, ke SAT ne povas havi kiel taskon "batali kontraŭ imperialistaj militoj". Tiaj militoj estas ja nur instrumentoj en la manoj de la imperialismo...

Ĉu tio signifas, ke SAT devas aprobi kaj subteni tiajn militojn? Certe ne. Mi celis nur montri la kontraŭdiron. Kaj por forigi ĝin estus pli logike kaj simple diri, ke SAT batalas kontraŭ la kapitalismo, tial ke tiu sistemo sin bazas sur la ekspluatado de la homo kontraŭ la homon. Kaj indiĝenoj ĉiaspecaj estas homoj.

Sed povos ankaŭ okazi estonte, kiam la socialismo estos venkinta en la ĉefaj partoj de l' mondo, ke indiĝenoj malkleraj, tradiciemaj kaj obeemaj al siaj estroj volos malpermesi la utiligadon de naturaj riĉaĵoj, ekzistantaj en ilia regiono. Tiam, eĉ socialisma ŝtato aŭ ŝtataro estos devigata perforte, milite — imperialisme — trudi sian teknikon al reakciaj, rutinemaj indiĝenoj. Ĉu tia imperialismo estos ankaŭ kondamninda kaj kontraŭbatalinda?

Alia parto ŝajnas al mi ankaŭ modifenda, nome tiu, kiu parolas pri "unuecfronto". Ni ja ne devas malatenti, ke tiu agitvorto estas konsiderata de kelkaj partiaj kaj sindikataj organizoj kiel artifiko, ruza taktiko por krei disigon en iliaj vicoj. Mi ne diskutos pri la praveco aŭ malpraveco de tiu konsidero. Mi nur notas fakton, kiun ĉiu K-do iom informita pri la laborista movado ne povas nei.

Aliparte, estas konate, ke partioj ŝanĝas kelkfoje sian taktikon, siajn agitvortojn. Kio certigas nin, ke la organizoj, kiujn oni celas logi per la meto en nian programon de la vorto "unuecfronto" konservos por ĝi sian nunan ŝaton?...

El tiuj rimarketoj ĉiu povas ekvidi, ke necesas tre atente kritiki ĉiun frazon de la projekto por forigi el ĝi ĉiun kontraŭdiron kaj ĉion povantan kaŭzi miskomprenon.

Ni atentu, ke temas starigi programon, kiu taŭgos ankoraŭ post kelkaj dekoj da jaroj.

Miaopinie, nia programo devas esti finverkata laŭ jenaj direktoj:

a) Ĝi estu precizsenca rilate al la fincelo: *sennacieco, senklaseco*, kaj sufiĉe elasta kaj nepreciza en siaj detaloj, por ke ĝi povu esti ankoraŭ aktuala post duonjarcento.

b) Ĝi sin bazu sur la opinio, ke la laborista klaso povos tute emancipiĝi nur laŭ tutmonda skalo; ke la civiliziloj estas la scienco, la tekniko, la organizado, unuvorte la *Racio;* ke ĉiu progreso rezultas el venko de racio super la sento, el venko de intelekto super instinkto, el venko de ordo super malordo, el venko de organizado super ĥaoso; ke la klasbatalo estas historia fakto kaj faktoro de progreso.

c) La kapitalismo estas malracia; ĝi okazigas militojn, senlaborecon, mizeron. Tamen, en sia imperialisma kaj lasta stadio ĝi kreas mondekonomion. Mondekonomio kreas la objektivajn kondiĉojn por ekzisto de mondlingvo. Mondlingvo embrie jam ekzistas kaj funkcias sub la formo de esperanto.

d) La socialismo celas starigi tutmondan sociordon racian. En tiu giganta entrepreno SAT prenis sur sin la taskon mondskale ordigi, raciigi la spiritajn interrilatojn de la proletoj per apliko de esperanto, facillernebla kaj senlime evoluebla lingvo. La kelkjara ekzisto de SAT jam pruvis nerifuteble, ke simplaj laboristoj el la tuta mondo povas bone interrilati sen la helpo de tradukistoj; ke mondkongresoj povas facile okazi sen helpo de interpretistoj. Sekve, ke la nuna lingva ĥaoso povas esti ordigata de la racio kaj ke nur ne sufiĉa informiĝo aŭ persona intereso de poliglotaj gvidantoj povas esti la kaŭzo, ke ekzistas ankoraŭ lingvaj baroj inter la laboristoj.

e) La lingva unueco estas potenca faktoro en la historia evoluo de la homa socio. Ĝi ebligas unueciĝon en pensmaniero, kreas unuecan spirito-staton kaj sekve forigas la subjektivajn kaŭzojn, kiuj malfruigas la adaptiĝon de la ideologio al la jam ekzistantaj objektivaj kondiĉoj por sennacieca mondmastrumado.

f) La samlingveco ebligas al la SAT-anoj konduti *inter si* kiel veraj sennaciuloj. Ili povas en sia organizformo tute ignori la naciojn. Sed ili ne propagandas tian organizsistemon al nesamlingvanoj, tia! ke tio similus la agon de iu, kiu volus instrui beletristikon al analfabetuloj.

g) Per la kreo de monda literaturo, senigita je naciaj trajtoj, SAT ludas tre gravan kulturan rolon.

h) Per siaj gazetoj, legataj en ĉiuj partoj de l' mondo, per sia informservo, per sia organizado de korespondado el fabriko al fabriko, el sindikato al sindikato ktp., per la diversaj servoj faritaj al siaj membroj, SAT faras praktikan kaj tre utilan laboron, kiu meritas la subtenon de ĉiuj laboristaj organizoj.

Ĉu tiuj miaj rimarkoj signifas, ke la jam publikigita projekto estas senvalora? Kompreneble ne. Ĝi ja enhavas kelkajn bonajn partojn. Antaŭ du jaroj mi eĉ emis akcepti ĝin preskaŭ senŝanĝe. Sed la vivo ĉiutage instruas, se oni meditas pri ĝiaj lecionoj. La sperto montras, ke ju malpli nia Asocio similos al la politikaj organizoj, des pli bone ĝi povos ludi sian historian rolon. Ju pli la SAT-anoj kutimiĝos prikonsideri la taskojn de nia Asocio je eksterpartia vidpunkto, des pli bone ili povos utiligi esperanton en sia propra partio mem. *E. Lanty.*

*

Pri la projekto de Programo

Oni parolas ordinare pri la 3 batalfrontoj de subpremituloj: politika, kultura, kaj ekonomia. Kaj jen malgraŭ la urĝa neceseco de politika unuecfronto ĝi nuntempe estas ja tute neebla. La gvidantoj de la samtendenculoj plej ofte kaj plej akre interdisputas. La amasoj dume, bedaŭrinde, ne scipovas agi tute memstare. Sur kulturfronto, laŭ ŝajne diversaj direktoj, se ili ne kontraŭbatalas unu la alian, ne estas danĝeraj. Sur la ekonomia fronto, de kiu multe dependas la du aliaj, eblas plena unuecfronto. Se la profesia laborista movado, pli proksima al la politika fronto, havas kelkajn centrojn (profintern, Amsterdama internacio, Berlina...), do la kooperativa Internacio havas fakte nur unu centron. Miaopinie en ĝi necesas sekvantaj pliboniĝoj, necesas konkiri la akcepton de esperanto kiel *unu el la oficialaj* lingvoj de la kooperativo-internacio kaj la eblecon de individua aneco (plej malmulte da perantoj!...).

En SAT mi vidas, kvankam ankoraŭ tro etan, eron de estonta supernacia kooperativa unuiĝo.

Estus dezirinde ke en "S-ulo" pli ofte aperu raportoj pri la internacia kooperativo-movado, ekzemple pri la okazonta en Stokholmo internacia kooperativa kongreso ktp.

Jak. Brukson, SAT-ano 1896, Leningrado.

*

Iom pri rilatoj inter SAT kaj landaj lab. esp. Asocioj

Jam estis elektita komisiono por studi tiun problemon ĉe unu el SAT-kongresoj, sed ion realan ni ne vidis el laboroj de ĉi komisiono. Estas malnova vero, ke SAT kaj LEA kompletigas unu la alian, sed malgraŭ tio ĝis nun oni laboras parte dise, parte kune, parte tute sendepende. Estus bone, se oni pli intime interligos la tutmondan kaj landajn organizojn, ja ĉiuj apartenas al unu movado, laboras por la sama celo. La burĝoj donis al ni bonan ekzemplon[1]) en la t. n. kontrakto de Helsinki; laŭ ĝi per la internacia centra komitato de esp-o-movado (legu burĝa) estas reprezente ligitaj ĉiuj landaj organizoj kun UEA. Ĉu ni estas tiom stultaj por ne krei nian propran kontraŭfronton? Ĉu ne estus eble, ke ie kunvenu reprezentantoj de ĉiuj niaj organizoj por klare skribe fiksi en iu konvencio SAT-

[1]) Estas dube, ĉu la ekzemplo estas bona, tial ke UEA plendas pro malprospero.

LEA-oj la taskojn kaj sferojn de agado, la interrilatojn ktp.? Do subskribi konvencion pri reciproka subteno kaj defendo.

Oni povus tiam ankaŭ reguligi la tedan dukotizan sistemon SAT-LEA, se LEA ekz. rabatos iom per SAT-anoj, anoj de LEA kaj SAT permesos al ili pagi nur 1 kotizon al LEA, kiu donaŝ el ĝi certan procenton al SAT.

La elementa paŝo al pligranda proksimiĝo de organizoj kaj interŝanĝo de ĉiulandaj spertoj estas jena. Oni rimarkas ke tre multa materialo propaganda, instrua, kronika k. s. valora por la tuta mondo estas nure presata en nacilingvaj lab. esp. organoj.

Mi proponas, ke SAT disponu en "S-ulo" al landaj organizoj specialan paĝon, kie ili povos raporti regule pri sia agado, spertoj, entreprenoj, sukcesoj ktp.[1]).

Krome redakcio de "S-ulo" komisiu[2]) diverslandajn K-dojn per tasko tradukadi por "S-ulo" ĉiujn bonajn artikolojn kaj kronikon el nacilingvaj esp-organoj lab. por "S-ulo".

Ĉi proponoj kaj sugestoj ankaŭ liveru materialon diskutendan dum Lyon'a kongreso. *H. Muravkin (2921).*

*

Propono n-o 7

Dum la Lyon'a kongreso estu elektata Lingva Komisiono, konsistonta el 3—5 samurbaj Kamaradoj, plene kompetentaj en esperantlingvaj problemoj. La komisiono regule kunvenados kaj pritraktados nur gravajn lingvajn aferojn. Precipe gravajn temojn ĝi povos antaŭ la findecido meti je publika diskuto sur la paĝoj de "S-ulo". La decidoj de la komisiono estos devigaj por ĉiuj, ili estos kondiĉo por perfekta uzado de esperanto.

La aktivajn Kamaradojn mi insiste petas pensi pri tio.

(7075.)

Propono n-o 8

La kongreso decidu:

Ĉiumonate estu minimume enpresata kvarona paĝo por la "Ŝakuloj".

Motivigo: "Granda parto de SAT-anoj ludas ŝakon kaj pro tio ili deziras interŝanĝon de diversaj problemoj kun la eksterlandanoj. La nombro de la interesuloj pri tiaj problemoj pli kaj pli grandiĝas. Pro tio la Chemnitz'a SAT-rondo opinias, ke estas pli sukcesplene enigi kvaronan paĝon kiel "ŝakangulon".

SAT-rondo Chemnitz.

[1]) Ni rediradas, ke neniam ni rifuzis publikigi raportojn de landaj organizoj.

[2]) Tia diro estas absoluta nekompreno pri la situacio ekzistanta en nia movado. Ĉu do oni jam ne multfoje spertis, ke eĉ K-doj, kiuj libervole akceptis plenumi iun taskon, tamen tion ne faris, aŭ ĉesis fari sen ia averto? Oni povas komisii aŭ ordoni nur al dungitoj. Oni eĉ devas scii, ke ekzistas en SAT mem K-doj, kiuj preferas informi la neŭtralan "Heroldo"-n ol "S-ulo"-n. Ne dependas de la Redakcio de "S-ulo", nek de la E. K. de SAT se en kelkaj landaj asocioj oni ne havas ĝustan komprenon pri la rolo de SAT. La situacio ŝanĝos nur kiam en la kadro mem de tiuj asocioj SAT-anoj faros la necesan propagandon kaj laboron. *E. L.*

Propono n-o 9

SAT-anoj (despli SAT-organoj) kutimiĝu tute ne uzi nacian ortografion de propraj nomoj. La nacian ni enkrampigu nur en ekstrema bezono, kiam nacia prononco estas nekonata aŭ neĝusta.

Mi reproponas diskuti kaj reakcepti tiujn prilingvajn tezojn, kiuj estis sendiskute akceptitaj de 6-a Kongreso.

Maks. Krjukov.

La unua provo de sennacieca arto

estas la serio de poŝtkartoj ĵus eldonitaj. — Unu serio konsistas el kvin kartoj kaj kostas 0,50 mk. germ. Mendu tuj ĉe la **Administrejo de SAT, Richard Lerchner, Colmst.1, Leipzig O 27**

La plej bona propagandilo por SAT

RAPORTO DE LA ADMINISTRACIA KOMISIONO

En januaro 1927 la nuna A. K. estas elektita el la Leipziga SAT-anaro, aprobita de E. K. Ĉi komisiono tuj formiĝis elektinte el si mem estron kaj sekretarion, ĝi kreis labor-programon, por esti kapabla laŭ la regularo trakti niajn aferojn. Menciinde estas, ke ĉiu A. K.-ano nepre devas esti akurata, tio montris tre bone, ke per iom da proleta disciplino oni atingas la deziritan celon.

A. K. ĉiumonate, pro gravaj urĝaj aferoj pli ofte, kunvenas. K-do Lerchner kiel administranto prezentas al A. K. la prilaborotan materialon, kiu ĉefe estas la kontrolo de la kontresumoj kaj korespondaĵoj kun E. K. kaj aliaj.

Administrejo

Ĝi estas kvazaŭ malgranda ĉambro en kiu troviĝas fakaro plena je broŝuroj, libroj, gazetoj kaj pakaĵoj. Tablo por du skribmaŝinoj kaj tablo por pritrakti la korespondaĵojn, kalkuladon, ekspedadon ktp.

Administraj personoj kaj iliaj salajroj

Administranto kaj du helpantinoj. La administranto laborante senlace, senĉese, post okhora labortago ricevas por sia oferema nervardetruanta laborado salajron de ĉiloka presisto. Ambaŭ helpantinoj laŭ la helplaboranta tarifo de la presistoj. Ambaŭ adm. helpantinoj estas sub la gvido de la administranto. Ĉio estas orde aranĝita kaj ĉiuj laboroj fluas aŭtomate. Krom la adm. laboroj la administranto legas presprovaĵojn. Ĉiujare niaj salajrigitaj gelaborantoj ricevas 14-tagan forpermeson.

Laboro de A. K.

Ĉar SAT konsistas el tutmonda gemembraro, ĉar la korespondado de instanco al instanco, pro la malproksimo, ofte daŭras longe, la administrado kaj komisiona laboro estas iom komplikaj. Komence okazis ofte malfacilaĵoj, sed iom post iom tiu ĉi situacio pliboniĝis. Administranto, kies tasko postulas esti ĉiuflanke respondeca, devas esti korpa kaj spirita heroo. Do A. K. ekde sia funkciado surprenis la respondecon de administrado. Apude A. K. konstatas ke, se SAT same kreskos kiel ĝis nun, ni devas timi pri la sano de la administranto aŭ kompletigi nian personaron oficejan.

En marto 1927, la administranto plendis, ke li ne povas mendi elĉerpitajn broŝurojn ĉe la presejo, ĉar nia mono troviĝis en la Moskva agentejo de SAT. A. K. sin turnis al Sovetia Popol-Komisaro de la Financoj, por mildigi la leĝajn dekretojn rilate monsendadon eksterlanden. Helpis iomete, sed antaŭ nelonge A. K. denove devis fari novan paŝon en ĉi tiu rilato. Ni esperu, ke per la lasta rimedo uzita, tiu malagrablaĵo estos nuligota.

Malkonsentoj inter la presejo kaj administracio, samkiel inter la membraro, kiuj vere ne estis gravaj, estis kontrolitaj kaj finitaj.

Specialan fakon montris la alvoko en "S-ulo" pri propra preseja entrepreno. A. K. unuanime aprobis la problemon, ĉar laŭ preciza kalkulado kelkaj miloj da germanaj markoj pojare povas esti ĵetataj en nian buĝeton ĝis nun donitaj al presisto. Parton de tiu sumo ni povus uzi por eldoni novajn librojn ktp., krei novan profiteton por SAT kaj per tio levi la aktivecon de SAT ĉe la esperantista kaj neesperantista mondproletaro.

A. K. esprimas deziron, krei indan staton por niaj geoficistoj, instali entreprenon kun oficejo, presejo, provizejo. Nur tiele vera SAT-vivo estas konstatebla. Alia malagrabla afero estas la konstato, ke multaj SAT-anoj malĝuste afrankas siajn korespondaĵojn, rezultante respektindan sumon je malprofito de SAT-buĝeto.

Diversaj punktoj: deziroj de neesperantistaj organizoj estas senditaj al E. K., ĉar A. K. ne estas sufiĉe kompetenta juĝi en tiuj gravaj ekaperoj. Krome, niaj oficejaj fortoj apenaŭ sufiĉas por ordigi niajn aferojn.

El la senditaj projektoj por il. p. k. A. K. rekomendis ĉe E. K. akcepti la kvinoblan serion, senditan el Sovetio. E. K. aprobis kaj intertempe la il. p. k. aperis en 30 000 serioj. Okaze de la 40-jara jubileo A. K. konsentis presigi leter-kovertojn kiel propagandilon de esp-o.

Oficialaj leter-folioj kaj kovertoj de SAT estos presataj.

A. K. malaprobas estonte elspezi proksimume 6000 M. por la Jarlibro. La

Kongreso diskutu la solvon de la problemo pri sufiĉa plimalkarigo de la Jarlibro.

La raporto estas respondata unuanime de ĉiuj A. K.-anoj kaj ili rekomendas al la Kongreso aprobi la agadon de la Administracio.

*

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Britio. BLEA eldonis novan propagandfolieton. La korespondkurso de la Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj bone sukcesis k. supera kurso prepariĝis. K-do 480 paroladis ĉe la Lab. Esp.-Klubo en *Londono* pri "Ŝovinismo en la lernejo", pri kiu li intencas verki libron parte per esp-o kolektita. — La Proleta Esperanta Konferenco en *Leeds,* okazinta la 9. 7. 27, estis grandsukcesa. Ĉeestis 59 delegitoj k. 37 vizitantoj. Al la 60 salutintaj alilandaj K-doj oni sendas elkorajn dankojn. — Sukcesplena dekhora renkonto estis aranĝita la 19. 7. 27 de la BLEA ĉe *St. Allans* (Londono). Parolis M. Starr pri Ŝovinismo en la lernejo, prezidis K-do Leakey. Post tagmanĝo k. vizito de abatejo, lekciis J. Flors pri la Materialista koncepto de historio. Drama rondo de la Lab. Esp.-Klubo Londono prezentis la originalan esperantan teatraĵeton "Ifigenio". Okazis kunkantado kaj konkurso pri la plej bona elparolado de esp-o. Inter la ĉeestantoj estis K-do P. Christenson el Usono k. K-do el Jugoslavio. — **Bulgario.** Multaj esp. K-doj troviĝas en malliberejoj. Kelkaj skribis al ni. Jen unu el ili: "Antaŭ 6 tagoj mi estis kondamnita je 2 jaroj laŭ la Leĝo de Ŝtatdefendo aŭ pli prave de Registaro. Nune mi denove kuraĝiĝas k. atendas politikamnestion. Eble post 4 monatoj mi eliros eksteren. Mankas legaĵoj. Se vi aŭ K-do M. posedas SAT-eldonaĵojn, bonvolu sendi al mi. Mi kamarade salutas vin, Georgi N. Gaĝev, distrikta malliberejo, Haskovo." Espereble troviĝos skribemaj K-doj. — **Ĉeĥoslovakio.** La socialista junula grupo en *Holeischen* solenis la 2. 6. 27 la 40-jaran datrevenon de esp-o. Du el la estraranoj estas SAT-anoj. K-do deklamis esp-o-poemon, SAT-ano parolis pri siaj spertoj tra la tutmondo per korespondado. K-do 4102 parolis pri la evoluo de la homa socio, ekonomio k. lingvo. Plie esprimis la kunveno al nia progresema komunumo koran dankon por la al esp-o-propagando dediĉitaj 500 kĉ. — La Esperantotago en *Gablonz a. N.*, aranĝita la 12. 6. 27 de la tiea Lab. Esp.-Grupo, ricevis pro sia impona procesio specialan atenton. Partoprenis 150 esp. K-doj el ĉiuj partoj de la respubliko. K-do Bauer salutis la ĉeestantojn; parolis K-do Hloupy el Praha. Ĝoje salutita estis K-do Scherbaum el Saksio, veninta kun multaj saksaj K-doj; propaganda aŭtomobilo, en kiu estis videblaj homoj el ĉiuj klasoj k. nacioj, super kiuj surskribaĵo: "Ni ĉiuj povas nin kompreni, ĉar ni ĉiuj parolas esp-on! "Lekciis K-doj Scherbaum. Hloupy, Wünsch, David k. K-dino Bouda. K-do Janeĉka raportis. ke la redakcio de la germana "Vorwärts" ("Antaŭen") akceptis enŝovi ĉiusemajne esp-an angulon en la gazeto. La penadoj certe donos abundan rikolton. Fine de majo okazis Konferenco en Friedrichswald. kie estis reprezentitaj la grupoj Gablonz, Reichenberg, Grünwald. Kamnitztal, Antoniwald. Neustadt a. d. T.. Maffersdorf. Ĝin malfermis kaj prezidis K-do Bauer el Gablonz. — En *Warnsdorf,* la 24. 5. 27, fondiĝis SAT-rondo al kiu aniĝis 20 esperanto-scipovaj gelaboristoj. La rondo kunvenas ĉiumarde je la 20-a h. en "Vereinshaus". Döllingerstrato. Laŭ deziro de la Gek-doj okazas regule parolrondoj en diversaj urbopartoj. Imitinde! — **Francio.** La UFE (Union Fédérale des Etudiants = Federacia Unuiĝo de Studentoj, 51, rue Montagne-Sainte-Geneviève, *Paris V-e)* anoncas, ke la Kongreso de la UFE, vidante la ĉiam kreskantan gravecon de esp-o, decidis ĝin alpreni kiel lingvon por la internaciaj rilatoj de UFE. Krome ĝi decidis aldoni esp-istan sekretarion al la oficejoj de la lokaj Unuiĝoj. Por helpi al la propagando de esp-o estos kreita esp-ista rubriko en la eldonaĵo "Etudiants Nouveaux" (Novaj Studentoj). Fine ĝi decidis, ke la UFE estu oficiale reprezentita k. en la proksima kongreso de SAT, dezirante aliĝi al SAT. — **Germanio.** La SAT-anoj en *Chemnitz* decidis starigi SAT-rondon. La fondo celas, havigi al ili interŝanĝon per komuna korespondado kun laboristoj el ĉiuj landoj. Per ĉi tiu aranĝo ili volas sennaciigi la ge-SAT-anojn. — La SAT-rondo en *Meissen* kune kun la LEA-grupo proponis al la urba parlamento la enkondukon de esp-o en la popollernejoj, kio estis akceptita. La instruadon partoprenas 55 geknaboj sub la gvido de du esp-o-instruistoj. — En *Stuttgart* okazis la 18. 6. 27 komuna kunveno de SAT k. LEA. Ĉeestis 39 Gek-doj. Parolis pri "La virino en la industrio" K-dino Schäfer. Por la SAT-kongreso sin anoncis 14 K-doj. Kunveno el SAT-anoj en *Vildsachsen (Taunusmontaro)* okazis la 26. 6. 27 en la "Naturamika Domo" de la sekcio Mainz sub la prezido de K-do Roth el Frankfurt a. M. Post vigla diskutado oni esprimis la opinion, ke la en "S-ulo" troviĝanta projekto estas tro longa kaj estu anstataŭata de pli klara kaj facilkomprenebla teksto. Pri fondo de SAT-presejo: oni lasu tian projekton ĝis venos la ĝusta tempo, kiu estos se SAT-nombras 12 000 pagantajn membrojn. Oni kritikis akre la almozpetadon pere de la Jubilea ĉeno. Pli bone estus fiksi sufiĉe altan-kotizon por la membraro. Oficiala fondo de SAT-grupoj: unuanime la K-doj estas kontraŭ la oficiala fondo de SAT-grupoj, ĉar tiaj grupoj nuntempe danĝerigas la ekziston de landaj organizoj. Oni organizu SAT-rondojn. Oni kritikis pri la postulemo de vojaĝantaj SAT-anoj k. proponis starigon de lokaj vojaĝkasoj por subteni tiujn K-dojn, kiuj pro politika afero devis rifuĝi, la aliaj estu ĉiuj sindikate organizitaj kaj eluzu la koncernajn sindikatkasojn. — La LEA-grupo en *Hennigsdorf* unuafoje sed grandsukcese aperis publike dum laborista sportfesto de la distrikto Velteno (Osthavelland). La aranĝita mezgranda ekspozicio de esp-aĵoj bone impresis. Dum la malferma parolado, la prezidanto Kulturkartela interalie diris: *"Ne, ne helplingvo, sed la ĉefa lingvo devus esti esp-o por la homaro!"* K-do Ŝoĉau parolis speciale pri esp-o, menciante ankaŭ SAT. — **Hispanio.** En Palafrugell (prov. Gerono) tri kursoj, direktataj de Gek-doj 7389, 8163 k. 8159, 357. Partoprenas ĉ. 50 gel. Granda entuziasmo. Dum la ĝenerala kunsido de la "Sindikato Unika" (ruĝa). kie troviĝas la esp-o-grupo, parolis K-do 7389 pri esp-o k. klerigado, K-do 357 pri la disvastigo de esp-o en Hispanio kaj la tuta mondo, pri la alpreno de esp-o flanke de la Laboristaro por pli facile sin liberigi de la ĉiuspecaj katenoj. — **Holando.** Laborista Kunveno en *Aalsmeer* sendis jenan telegramon en esp-o al la havenlaboristoj en Norvegio: "Aalsmeraj laboristoj en protestkunveno deklaras plenan simpation kun via anoncita bojkotado de usonaj artikloj. kiam kondamno estus ekzekutita al Sacco kaj Vanzetti." — **Jugoslavio.** — En Kraljevo laborista kurso gvidata de K-do 8882 kun 11 partoprenantoj. Baldaŭ nova. ĉar intereso pligrandiĝis. — **Latvio.** La 3. 7. 27 okazis en *Riga* eksterordinara kunveno de Latvia Lab. Esp. Societo. Elektita nova estraro: A. Krastin, prez.; Fr. Garin, vizprez.; A. Krumin, sekr.; Alv. Erlich, vicsekr-ino; O. Straume, kasisto; ĉiuj SAT-anoj. Adreso: Sekr. Krumin, Barinu iela n-o 7, dz. 41, Riga, Latvio. — En *Liepaja* fondiĝis filio de Latvia Lab. Esp. Societo. Prezidanto: K-do B. Erglis. — **Litovio.** La 29. 6. 27 en la Popoldomo de *Ŝiauliai* okazis juĝo pri esp-o. La juĝistoj estis: advokato Markauskas (socialdem.), inspektoro de l' popollernejoj Ubeika kaj la gvidanto de la laborborso Varnauskas (socialdem.). La kulpigantoj estis s-roj Baldauskas kaj Niunkis. La lingvon defendis K-doj SAT-anoj Mediŝauskas kaj Lakaŝanskis. Delegitoj de kelkaj organizoj deklaris, ke ili ĉiam apogos kaj disvastigos esp-on. Pri signifo de esp-o por laboristoj parolis K-do Januŝkis, estinta deputito de l' socialdemokrata frakcio. Post ĉiuj paroladoj la juĝistoj anoncis rezolucion, ke esp-o havas plenan rajton ekzisti k. disvastiĝi, k. ĉiu konscia homo devas ĝin ellerni k. apogi. Pli ol ducent ĉeestantoj varmege aplaŭdis tiunĉi konkludon. — **Polio.** La 9. 7. 27 en Lodz K-do J. Zavada el Przysucha parolis ĉe la Liberpensuloj pri "Kion ĉiu liberpensulo devas scii pri esp-o". La sukceso estis granda. Kiam iu "Pan-Eŭrop-ano" penis pruvi, ke esp-o fratigas *ĉiujn* homojn, K-do 7076 akcentis la abismon inter la neŭtraluloj kaj la klaskonsciaj laborist-esp-istoj. Vane alia neŭtralulo provis konvinki, ke kapitalistoj ankaŭ "laboras". La ĉeestantaro nur ridegis pri li. Rezulte malfermiĝas novaj kursoj en laboristaj medioj. — En *Lwow* dank' al fervora laboro de K-do Maiblum la nombro de SAT-anoj pligrandiĝas. En la loka societo preskaŭ ĉiusabate SAT-anoj lekcias, ekz. K-do Starobudenko pri la Historio de esp-o, K-do Fejlo pri la Vivo de Zamenhof, K-do Popoviĉ pri SAT k. ĝia signifo por la tutmonda Proletaro. Ekzistas 2 kursoj: pli k. plej supera, gvidataj de K-do Maiblum. Plisuperkursanoj uzas "Petron". La tiea societo SAT-ana partoprenis la majan manifestacion kune kun la Lvova Proletaro. Je la kunvenego estis disdonitaj multe da flugfolioj. La 5. 5. 27 komencis nova kurso, senpaga. Partoprenas ĉ. 30 personoj. Gvidas K-do Zausmer. — **Svisio.** En junio okazis landa kongreso de ŝtataj oficistoj. Estis diskutite pri utiligo de esp-o en diversaj rilatoj; ne komprenante la gravecon de la demando, la kongreso malakceptis la proponon, sed tamen rekomendis al ambaŭ organoj: "Services Publics" k. "Oeffentliche Dienste" akcepti poresperantajn artikolojn. La pordo malfermiĝas. — En *Lausanne* ĵus fondiĝis "Filatelia Grupo", kiu celas interŝanĝi p. m. inter laboristoj tutmondaj. Literatura grupo fondiĝis sub auspicioj de la lab. grupo Zamenhof; celo: perfektiĝo en esperanta scipovo k. poresperanta agado antaŭ laboristaj ĵurnalaj. — — **Usono.** Pro la peno de K-do Paŭlo Krouch dum lia restado en Alcatratz, Kalifornio. K-do Oliver F. Olsbourne, alia soldato. kiu estis malliberigita tie. deziras, post sia liberiĝo, elmigri al Odeso, Sovetio, k. labori tie por la proleta respubliko. Tial li pensas, ke estu pli bone se li lernos esp-on, ĉar li ne konas la rusan lingvon. Li tute konsentas kun la celoj kaj idealoj de SAT k. jam estas SAT-ano. La 1. 6. 27 K-do Krouch estis liberigita k. tuj anoncis en letero al K-do 1092, ke "S-ulo" k. "SR" feliĉigis lian malliberecon, esprimante sian deziron SAT-aniĝi k. verki artikolon por "S-ulo". — Restadas alia soldato-revoluciulo en Alcatratz. Li estas George O. Pershing — poeto kies poemoj jam aperis k. aperas en kelkaj usonaj gazetoj. Li skribis. ke li estas pliboniganta sian esp-on por ke li povu mem esperantigi siajn poemojn. — Unuvorte el ĉie alflugas al ni ĝojigaj leteroj pri ĉiam pli k. pli granda interesiĝo al nia afero.

(Kompilite laŭ multaj leteroj.)

Noto: Pro manko de loko ni prokrastas la publikigon de la Kroniko el Sovetio.

"SENNACIECA REVUO"

aperos kiel triobla n-ro kaj estas ekspedata kun n-ro 152 de "Sennaciulo"

NIA POŜTO

Al K-doj 1100 k. 4172. — Se vi estus plenkonsciaj sennaciuloj, vi ne povus senti vin "ligataj" per la artikolo de K-do 488. Cetere, bonvolu noti bone en la memoron, ke "S-ulo" ne estas partia organo kaj sekve respondecas pri siaj artikoloj nur la verkintoj mem. *E. L.*

1810. — Viaj manuskriptoj estas taŭge aranĝitaj. Pri la motivoj de ilia ne publikigo, vi legu en mia raporto al la kongreso pri "S-ulo". *E. L.*

3126. — Via ideo estas bona, sed la alvoko aperus tro malfrue. Kvankam tiuj Kongresoj okazos preskaŭ samtempe kiel nia VII-a, ni tamen provos laŭeble fari klopodojn laŭ via deziro. *E. L.*

3635. — Ni ne povas enmiksiĝi en la mastrumado de SEU kaj sekve publikigi vian leteron. *E. L.*

6727. — Via propono ŝajnas al mi aprobinda. Necesas tamen koni la opinion de nia Administranto. Cetere ni havos okazon diskuti pri la demando ĉe la kongreso. *E. L.*

7075. — Vi tute miskomprenas la rolon de SAT. Rilate politikajn okazaĵojn, la SAT-anoj, partianoj, obeu la decidojn de siaj respektivaj partioj. La SAT-anoj, kiuj ne estas partianoj, obeu sian konsciencon. La rolo de SAT povas esti nur eduka en tiu senco, ke la konstanta praktikado de esperanto laŭ tutmonda skalo ebligas pli larĝan, pli ĝustan komprenon pri la problemoj. Postulante, ke SAT difinu sian starpunkton pri iu ajn aktuala politika demando, oni per tio povas nur celi, konscie aŭ nekonscie, la disfalon de nia Asocio. *E. L.*

9625. — Ni volonte publikigos informojn pri vivkondiĉoj en Aŭstralio. Necesas, ke vi ellernu la lingvon. *Red.*

E. S. S., ko. — Alifoje elektu pli bonajn bildojn; bluaj ne taŭgas por kliŝigo. *Red.*

★ DIVERSAĴOJ ★

NIA RESPONDO AL ĈEMBERLEN

K-do *J. Brukson* kaj K-dino *V. Gordon* (Leningrad) proponas specialan municifakon sub la nomo "Nia respondo al S-ro Ĉemberlen" okaze de la rompo de la interrilatoj inter Anglio kaj Sovetio. Tiu fako helpu financan plifortigon de la sola esp. proleta organizo SAT kaj tiamaniere malhelpu la eblan militon. Por komenci K-do *J. Brukson* kaj K-dino *V. Gordon* kotizas *2* rublojn kaj alvokas angliajn Gek-dojn kaj alilandajn fari la samon.

5-a sektora konferenco

okazos la 11. 9. 27 je la 13-a horo en *Rheydt* apud München-Gladbach (Rejnlando, Germ.). Tagordon ni post kelka tempo publikigos. Gek-doj dezirantaj paroladi pri interesa temo anonciĝu ĉe anstataŭanta sektorestro *A. von der Heid, Dortmund (Germ.), Junggesellenstr. 9.* Por vigligi la sektoran vivon ĉiuj landoj estu reprezentotaj. Vizitanoncoj jam nun estas petataj.

NEKROLOGO


La 18. 7. 1927 dronis dum banado nia K-do (9083)

Adolf Fajnŝtein

unu el la novaj esperantistoj aktive partopreninta en nia laboro.

Honoron al lia memoro!

Kieva SAT-grupo.



Kamaradoj havante emon kaj okazon por la

VENDADO DE FREŜAJ FLOROJ

al grandurbaj flormagazenoj dum vintro, skribu al mi pri reprezentado de miaj produktoj.

M. Harmsen (5679), floristo, Aalsmeer (Holando).

ATENTU!

Minska Distrikta Komitato de IRH petas IRH-organizojn k. apartajn K-dojn sendi leterojn, fotografaĵojn k. ĵurnalojn el IRH-vivo. Resp. garantiata.

Ĉion sendu al: **Minsk,** Komunistiĉeskaja, 20, kv. 6, Gr. Rappoport por IRH Minska.

ENHAVO:

Ni memoru!, de H. Barbusse, esperantigis 1784	pĝ. 1
Viena Revolucio, de Viena Ruĝulo	„ 2
El la sendependa Polio, de Iuelmultiuj	„ 2
Vivo kaj Profito, de 488	„ 2
Mia bela tago, de Vl. Kuzmiĉ	„ 3
Diskutejo	„ 3
Tra Esperantio	„ 4—8
Diversaĵoj, anoncoj	„ 8

Se vi volas konatiĝi kun vivo en la tuta mondo
kaj esti objektive informataj pri la okazaĵoj en ĉiuj landoj

pri internacia, politika, socia kaj kultura bataloj de la Proletaro

Legu:

A-I-Z
Laborista Ilustrita Gazeto Tutmonda

Aperas **semajne** kun unuaranga bildaro!

La plej granda proleta ilustrita gazeto de la mondo! — De nun ESPERANTO uzata kiel dua klariga teksto!

Postulu senpagan specimenon. Abonu ĉe la landaj agentejoj. (Ĉe komenco de adresoj — monata abontarifo.)

Argentino, 0,75 pes.: Jose Kassuel, BUENOS AIRES, Rue Mitre, 4219.
Aŭstrio, 2,10 ŝil.: Leop. Maresch, WIEN I, Bauernmarkt 1.
Belgio, 2,10 fr. b.: BRUXELLES, 59, Rue des Alexiens, Comitée de Secours Ouvrière.
Brazilio, 2,40 milr.: PORTO ALLEGRI (Rio Grande do Sul), Rua Volt Patria 365, Fritz Kniestedt.
Britio, 15 penc.: London, 25, New Street, SW I, M. Starr.
Bulgario, 45 lev.
Ĉeĥoslovakio, 9,75 kr.; B. Lucke, REICHENBERG, Karlsgasse 5.
Danio, 1,15 kr.
Danzig: Arbeiter-Bücherstube, Böttcherg. 23-27
Estonio, 1,20 mark.
Finnlando, 12 mark.
Francio, 3,85 fr. fr.: Messagéries L. Feiler, Hôt. d. Post., Boite Postale, PARIS.
Germanio, 0,75 mark: CENTREJO: BERLIN W 8, Wilhelmstr. 48. Neuer Deutscher Verlag.
Grekio, 22,50 drachm.
Hispanio, 1,85 peset.
Hungario, 1,80 peng.: Budapest VIII, Josefkörut 9. 1. 3, Hung. Esp. Soc. Laborista.
Italio, 6,75 lir.
Japanio, 0,60 jen.
Jugoslavio, 20 din.
Latvio, 1,50 lat: Riga, Liepajas iela 41, Latvia Laborista Esperanto-Asocio.
Litovio, 3 lit.
Nederlando, 0,75 guld.; H. v. Walree, Jan v. Galenstraat 291, AMSTERDAM.
Norvegio, 1,20 kr.
Palestino: TEL AVIV, P.O.B. 183 Jehuda Fries.
Polio, 2,50 zlot. **Portugalio**, 6 eskud.
Rumanio, 60 lej.
Sovet-Unio, 0,60 rubl.: Mejrabpom, MOSKVA, Tverskaja Jamskaja 3.
Svedio, 1,15 kr: STOCKHOLM, I. Johnson, Hülsingegaden 11, I.
Svisio, 1,50 fr.: Neuer Deutscher Verlag, ZÜRICH, Gerberg. 5.
U. S. A., 0,30 dol.: CHICAGO (ILLIN.), Bienenkamp, Madison Street 1553 W. NEW YORK CITY, 36—44 Ave. Wordsiede Z, Carl Gertic (Germany section W. P.).
Turkio, 0,60 funt. turk.

Landoj ne menciitaj mendu rekte de Berlin. — Monon sendu per poŝtmandato aŭ registritaj leteroj.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)